


DIA REGNO

ISSN 0167-9554

DIA REGNO

✧ dumonata kristana revuo en esperanto ✧ N-ro 1 (832) 2002 ✧



Ĵus antaŭ la pretigo de ĉi tiu numero, ni malĝoje eklernis la forpason de nia frato kaj amiko David FEATHERSTONE

**DU PLIAJ TRADUKOJ DE EPISTOLOJ
KRISTANAJ SPERTOJ
LA ESPERANTO-MOVADO VIVAS
NOVJARAJ SALUTOJ
IN MEMORIAM DE HOOG**

KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala, kunlaboranta kun
UEA

*Celo: Krei efikan kontakton inter kristanoj el
diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la
Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Jacques TUINDER

☐ Henegouwenlaan 35, NL 1966 RH
Heemskeerck ☎+31 251 231941;
☐ d.tuinder-dekker@wolmail.nl

Sekretario: Els VAN DIJK-KUPERUS

☐ Koningsmantel 4, NL 2403 HZ Alphen
a/d Rijn, Nederlando; ☎+31 1724 20222;
☐ j.a.van.dijk@hetnet.nl

Kasisto: Siegfried KRÜGER

☐ Dinkelsbühler Str. 12, DE 74074
Heilbronn, Germanio; ☎+49 7131 162688;
☐ slkrueger@gmx.de

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto,
minimume € 20,- ☐ Membro-subtenanto
€ 30,- ☐ Nura abono: pagante rekte al KELI
€ 16,- ☐ pagante al Libro servo € 18,- Sendoj
de okcidentaj monbiletoj per registrita letero
al la kasisto de KELI ☐ Se estas en via lando
UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA)
bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p**
de KELI ☐ Nederlanda poŝtĝirkonto de KELI:
5506132.

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo — ISSN 0167-9554

Redaktoro: Philippe COUSSON

☐ 26 rue de Pré-Ventenet, FR 86340
Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎+33 (0)5 49 46 80 21;
☐ diaregno@altern.com.

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ
egalvaloro. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al
la kasisto de KELI (vidu supre).

*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur
la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj,
kondiĉe, ke oni citas la fonton. Specimenon kun
reproso aŭ traduko oni sendu al la Redaktoro.*

**Enpaĝigo, grafika prilaboro, presado
kaj ekspedado:**

Eldonejo **hejme** Kazimierz LEJA
☐ pf. 59, PL 41-250 Czeladź, Pollando
☎+48 32 763 37 13; ☐ hejme@ineta.pl

ENHAVTABELO

- 3 Du pliaj tradukoj de Gerrit Berveling, la 2-a al Timoteo kaj Tito
- 7 Kristanismo en kaj ekster Esperantio
- 10 La novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA
- 12 Informoj el la vivo de la Esperanto-movado
- 20 Nekrologo: Henk DE HOOE
- 21 La novjaraj mesaĝoj de niaj prezidanto kaj kasisto
- 24 Rakonto pri fiŝkaptistoj

REDAKTORAJ VORTOJ

Karaj gefratoj,

Komenciĝis nova jaro. Kaj mi denove troviĝas antaŭ la ekrano de la komputilo por pretegi (malfrue) vian numeron de *Dia Regno*.

Mi konscias pri la rolo de la revuo. Mi eĉ ŝatus ke ĝi vojaĝu eksteren.

Antaŭ kelkaj jaroj, mi jam petis de vi tion, kion mi denove petas nun. Ĉu troviĝas inter vi kelkaj, kiuj pretus enkomputiligi kontribuojn, kiujn mi ricevas surpapere, enkomputiligo pri kiu mi ne disponas sufiĉe da tempo. Mi ankaŭ ŝatus la helpon de denaska anglalingvano por traduko de kelkaj depeŝoj de la ekumena informservo, kiun mi ricevas, sed same ne havas tempon traduki, kaj krome mi ne estas denaska anglalingvano.

Multajn informojn mi tiris el la du ĉefaj retaj fontoj de informo en la Esperanto-movado. Ilia servo estas grava, kaj mi volas danki al ili ambaŭ, kvankam, se mi bone komprenas, ili ne ludas en la sama paŝzorto. Ĉu mi rajtas esperi ke la esperantistoj baldaŭ kune batalos? Foje venas pozitivaj indikoj, foje ne.

Mi ankaŭ havas la saman esperon pri la kristanoj. Sed...

Baldaŭ, ni retroviĝos en Berekfürdő. Vidu la anoncon sur p. 23, kaj la aliĝilon. Plej kore kaj frate en la graco de nia Sinjoro.

Bonan novan jaron.

Philippe COUSSON

BIBLIO

AL TIMOTEO 2

1:1 Paŭlo, apostolo de Mesio Jesuo per la volo de Dio, laŭ la promeso de la vivo kiu estas en Mesio Jesuo, 2 al sia amata infano Timoteo: gracon, kompatemon kaj pacon de Dio la Patro kaj de Mesio Jesuo, nia Sinjoro.

3 Dion, kiun samkiel miaj gepatroj mi servas kun pura konscienco, mi dankas, kiam en miaj preĝoj senĉese mi memorigas pri vi, tage kaj nokte. 4 Mi varme deziras revidi vin, dum mi pensas pri viaj larmoj, por ke mi estu plenigita per ĝojo. 5 Tiam mi repensas pri via sincera fido, kiu antaŭe loĝis en via avino Loisa kaj en via patrino Eŭnika, kaj kiu nun (pri tio mi konvinkitas) <loĝas> ankaŭ en vi.

6 Tial mi instigas vin por bruligi la fajron de l' Diaj graciaĵoj, kiun vi havas en vi dank' al <tio, ke> la manojn mi surmetis al vi. 7 Ĉar Dio ne donis al ni spiriton de timemo, sed de forto, amo kaj prudento. 8 Do ne hontu atesti pri nia Sinjoro nek pri mi, lia katenito, sed portu vian parton de la suferado' por la bona mesaĝo, per la forto de Dio, 9 kiu savis nin kaj kiu vokis nin per sankta voko, ne pro niaj faroj sed laŭ Liaj decido kaj graco. <Tiun gracon> de eterne ni ricevis en Mesio Jesuo, 10 sed nun ĝi manifestiĝis per la epifanio² de nia savanto, Mesio Jesuo, kiu senigis la morton de ĝia forto kaj ekbriligis nepereeman vivon per la bona mesaĝo, 11 por kiu mi enoficiĝis kiel heroldo, apostolo kaj instruisto. 12 Tial mi devas suferi ĉi tion, sed pri tio mi ne hontas, ĉar mi scias al Kiu mian konfidon mi donis, kaj mi estas konvinkita, ke Li kapablas konservi ĝis tiu tago, kio estis konfidita al mi.

13 Kiel gvidilon vi prenu la sanajn principojn, kiujn vi transprenis de mi, en la fido kaj amo de Mesio Jesuo. 14 Kun la helpo de

la sankta Spirito, kiu loĝas en ni, vi konservu la trezoron al vi konfiditan.

15 Vi ja scias: en Azio ĉiuj forlasis min, interalie Figelo kaj Hermogeno. 16 La Sinjoro montru kompatemon al la domo de Oneziforo, ĉar ofte li refreŝigis min kaj li ne hontis pri miaj katenoj. 17 Male, kiam li venis al Romo, diligente li serĉadis min kaj min trovis.³ 18 La Sinjoro donu al li trovi kompatemon ĉe la Sinjoro en tiu tago. Kaj kiom li diakonis en Efezo, vi mem scias plej bone.

2:1 Vi do, mia infano, estu forta per la graco de Mesio Jesuo. 2 Kaj kion inter multaj atestantoj vi aŭdis pri mi, tion vi transdonu al fidindaj homoj, kapablaj siavice instrui aliajn. 3 Portu vian ŝarĝon kiel bona soldato de Mesio Jesuo. 4 Kiu militservas, ne okupiĝas pri civilaj aferoj, por plaĉi al siaj superuloj. 5 Kaj kiu okupiĝas pri sporto, ne gajnos premion, se li ne bone sportos. 6 La kampulo, kiu faras la pezan laboron, unuavice estas rajtigita je la fruktoj de sia laboro. 7 Atentu bone, kion mi diras: la Sinjoro donos ja al vi komprenon pri ĉio.

8 Tenu Jesuon Mesion en viaj pensoj, la Davididon, kiu revekiĝis el la mortintoj, laŭ mia bona mesaĝo. 9 Pro ĝi⁴ mi suferas kaj estas en karcerio, kvazaŭ krimulo. Sed la parolo de Dio ne estas katenita. 10 Tial mi preta suferi ĉion pro la elektitoj, por ke savon ili akiru en Mesio Jesuo, kaj eternan gloron. 11 Fidindas ĉi tiu diro:

se ja ni mortis kun li, ni ankaŭ vivos kun li.

12 Se ni persistos, ni ankaŭ reĝos kun li. Se ni malagnoskos lin, ankaŭ li malagnoskos nin.

13 Se ni estos malfidelaj, li <tamen> restos fidela:

malagnoski sin mem li ja ne povas.

14 Ĉi tion memoriĝu, kaj priĵuru <la fidulojn> je Dio, eviti vortbatalojn, ĉar tiuj kondukas al nenio, nur al pereado de l' aŭskultantoj. 15 Diligente laboru por esti fidinda antaŭ Dio,

kiel laboristo kiu ne devas honti kaj kiu honeste konfesas la parolon de la vero. 16 Evidu banalan kaj senenhavan babilaĉon; tio ja kondukas <la homojn> al malpieco, kaj ilia instruo plukreskos kvazaŭ kancero. 17 Al ili apartenas Himeneo kaj Fileto, 18 kiuj disiĝis de la vero, asertante ke jam okazis la resurekto, kaj ili subfosas la fidon de aliaj.

19 Tamen, neskueble firmas la fundamento, kiun metis Dio, kaj jen ĝia sigelo: *La Sinjoro konas la Siajn*, kaj: Ke ĉiu, kiu diras la nomon de la Sinjoro, restu for de malvirto. 20 En granda domo ne estas nur objektoj el oro kaj arĝento, sed ankaŭ el ligno kaj ceramiko, la unuaj <destinitaj> por festa, la aliaj por ĉiutaga uzado. 21 Kiu do sin purigis el ĉio ĉi, tiu estos nobla objekto, sanktigita, utila por sia sinjoro, taŭga por ĉiu bona celo.

22 Evidu la dezirojn de l' junaĝo, kaj strebu al justeco, fido, amo kaj paco, kune kun kiuj sincere alvokas la Sinjoron. 23 Ne okupiĝu pri la <konataj> stultaj kaj sensecaj temoj. Vi scias ke ili rezultigas nur batalojn. 24 Sklavovo de l' Sinjoro ne kverelu, sed estu afabla por ĉiuj. Li estu kapabla kaj pacienca instruisto, 25 kiu milde edukas la kontraŭantojn, ĉar eble Dio kondukos ilin al konvertiĝo kaj al rekono de la vero, 26 tiel ke ili sobriĝos kaj sin liberigos el la kaptilo de la diablo, kiu tenas ilin kaptitaj por fari lian volon.

3:1 Konsciu ĉi tion: en la lastaj tagoj venos malfacilaj momentoj. 2 Ĉar la homoj estos egoismaj, monhavemaj, fanfaronaj, fieraj, blasfemaj, ne obeemaj al la gepatroj, sendankaj, malpiaj, 3 senamaj, malpardonemaj, kalumniaj, nesinregaj, sovaĝaj, malbonvolaj, 4 perfidaj, troriskemaj, arogantaj, pli ĝuemaj ol Diemaj; 5 ili ŝajnis piecon sed ties esencon ili neos. Tiajn homojn tenu for de vi.

6 Al tiaj homoj apartenas, kiuj enŝteligas en la domojn por flate kapti la nesagaĵajn virinojn, kiuj vivas sub pekoj kaj pelataj de ĉiaspecaj deziroj; 7 kiuj ĉiam plu volas instruiĝi sed neniam atingas la scion pri

la vero. 8 Kiel siatempe Jannes kaj Jambres leviĝis kontraŭ Moseo, same tiel ĉi tiuj rezistas kontraŭ la vero, – ĉi homoj kun menso konfuza kaj fido nefidinda! 9 Sed ili havos malmulte da sukceso, ĉar ĉiuj travidos ilian malsaĝon, kiel ankaŭ okazis al tiuj du.

10 Vi, tamen, fidele min sekvis en mia instruo, miaj vivmaniero kaj strebado, en miaj fido, pacienco, amo kaj persistemo 11 dum la persekutoj kaj la suferoj, kiuj min trafis en Antioĥio, Ikonio kaj Listro. Ho kiom mi suferis! sed la Sinjoro min savis el ĉiuj ĉi persekutoj. 12 Fakte, persekutigoj ĉiuj, kiuj volas vivi pie en Mesio Jesuo. 13 Fiuloj kaj fraŭdantoj ĉiam pli malboniĝas: trompistoj <ili estas>, kiuj <volas esti> trompataj. 14 Do vin tenu je la instruo, kiun fidule vi akceptis. Vi ja scias, kiuj instruis vin. 15 De junaĝo vi konas la sanktajn Skribojn, el kiuj saĝon vi povos ĉerpi² por saviĝo, per la fido en Mesio Jesuo. 16 Ĉiu <parolo de la> Skribo estas inspirita de Dio, do povos utili por instruado, por refutado, por ĝustigo de la moroj kaj por edukado al vivo justula, 17 por ke la homo de Dio estu perfekta, preparita por ĉia bona faro.

4:1 Mi priĵuras vin antaŭ Dio kaj antaŭ Mesio Jesuo, kiu juĝos vivajn kaj mortajn, – <mi priĵuras vin> je lia epifanio kaj je lia reĝeco: 2 heroldu la parolon, insistu trafe maltrafe, refutu, riproĉu, kuraĝigu, kun ĉiu pacienco bezonata por instruado. 3 Ĉar venos la tempo, ke la sanan instruon oni ne plu toleros, sed laŭ propra gusto amasigos al si instruistojn, por flati la orelojn. 4 Kaj siajn orelojn oni fermos por la vero, kaj sin turnos al ĉiuspecaj mitoj. 5 Sed vi, restu ĉe tio sobra, eltenu, faru la evangeliistan laboron, fidele plenumu vian diakonecon.

6 <Kiom koncernas> min: mia sango baldaŭ estos verŝata, proksimas la horo de mia forpaso. 7 La bonan batalon mi batalis, la vetkuron mi elfinis, la fidon mi konservis. 8 Nun min atendas la florkrono de l' justeco,

kiun la Sinjoro, la justa juĝisto, donos al mi tiutage, kaj ne nur al mi, sed al ĉiuj, kiuj ame sopiras lian epifanion.

9 Klopodu baldaŭ veni al mi. 10 Ĉar Demas forlasis min, pro amo al ĉi mondo. Li foriris al Tesaloniko, Krescens al Galatio, Tito al Dalmatio. 11 Nur Luko estas ĉe mi. Kunirigu kun vi Markon al mi, ĉar li estos al mi tre utila por la diakoneco. 12 Tiĥikon mi sendis al Efezo. 13 La mantelon, kiun en Troas mi forgesis ĉe Karpo, vi kunportu kiam vi venos, kaj ankaŭ la librojn, precipe la pergamenaĵojn.

14 Aleksandro, la kuproforĝisto, kaŭzis al mi multe da malbono. *La Sinjoro repagos al li laŭ liaj agoj*. 15 Ankaŭ vi atentu pri li, ĉar niajn parolojn li akre kontraŭis. 16 Ĉe mia unua apologio⁶, neniu min helpis; sed ĉiuj forlasis min. Ne estu kalkulite al ili. 17 Sed la Sinjoro flankis je mi kaj donis al mi la forton, por ke kompletiĝu per mi la heroldado <de la bona mesaĝo>, tiel ke ĉiuj popoloj aŭdis pri ĝi, kaj mi saviĝis *el la leona faŭko*. 18 Kaj la Sinjoro daŭre ŝirmos min kontraŭ ĉiuj malbonaj atakoj, kaj Li savos min por Sia ĉiela regno. Al Li estu la gloro ĝiseterne! Amen.

19 Brakumu Priskan kaj Akvilon, kaj la domon de Onesiforo. 20 Erasto postrestis en Korinto. Trofimon mi postlasis malsana en Mileto. 21 Klopodu veni al mi antaŭ la vintro. Brakumas vin Eŭbulo, Pudens, Lino, Klaŭdia kaj ĉiuj gefratoj.

22 La Sinjoro estu kun via spirito. La graeco estu kun vi.⁷

¹ Pli laŭlitera traduko: kunsufero.

² Aŭ: malkaŝiĝo.

³ Oni konsciu, ke tiutempe eĉ en Romo, urbo kun pli ol miliono da loĝantoj, tute ne ekzistis stratindikoj aŭ nomŝildoj.

⁴ Aŭ: pro li.

⁵ Pli laŭlitera: kiuj povas saĝiĝi vin al saviĝo.

⁶ Defendo-parolado, ĉe tribunalo aŭ simile.

⁷ Tiu ĉi lasta 'vi' subite estas plurala.

AL TITO

1:1 Paŭlo, sklavo de Dio, kaj apostolo de Jesuo Mesio por <konduki> la elektitojn de Dio al la fido kaj al la scio de la vera religio, 2 en espero je vivo eterna, kiun jam antaŭ eternaj tempoj promesis la senmensoga Dio, 3 kaj nun, je la fiksita momento, Li malkaŝis Sian parolon en la heroldado <de la bona mesaĝo>, kiu estis konfidita al mi laŭ ordono de Dio, nia savanto. 4 Al Tito, la laŭleĝa filo en la komuna fido: gracon kaj pacon de Dio la Patro kaj de Mesio Jesuo, nia savanto.

5 Sur Kreto mi postlasis vin, por ke la ceteron organizu vi, enoficigante en ĉiu urbo pliaĝulojn¹, kiel mi ordonis: 6 ili estu senriproĉaj, edzoj de unu edzino², ili havu infanojn, kiuj estu fiduloj kaj ne misfamaj pro diboĉado aŭ ribelemaj. 7 Ĉar la episkopo, kiel prizorganto de la domo de Dio, estu senriproĉa, ne aroga, ne koleriĝema, ne sklaviĝinta al la vino, ne batalema, ne havema, 8 sed gastema, bonvola, saĝa, justa, pia, sobra. 9 Li sin tenu je la fidinda parolo de l' doktrino, tiel ke li kapablos kuraĝigi <la eklezion> per la sana instruado kaj refuti kontraŭulojn.

10 Ĉar multaj ne estas emaj obei, frazemuloj, kiuj konfuzas la kapojn, precipe inter la cirkumciditoj. 11 Tiujn oni buŝumu: tutajn familiojn ili pereigas, instruante nedecaĵojn pro nura gajnespero. 12 Unu elinter ili, ilia propra profeto, diris:

'Stas Kretanoj — mensogaj, fibestoj, pigraj ventregoj.'³

13 Tio estas vera atestaĵo. Tial ilin vi akre admonu, tiel ke resaniĝu ilia fido, 14 kaj ili ne plu okupiĝu pri Judaj mitoj kaj ordonoj de homoj, kiuj sin fortunigas de la vero.

15 'Ĉio puras por la puruloj'. Sed por infektitoj kaj nefidindaj⁴ nenio estas pura, ĉar putriĝis ankaŭ iliaj menso kaj konscienco. 16 Ili asertas koni Dion, sed ili neas Lin per siaj

agoj, — estante abomenindaj, netrakteblaj, taŭgaj por nenio bona.

2:1 Sed vi: parolu, kio kongruas al la sana instruo. 2 Viroj pliaĝaj estu sobraj, seriozaj, prudentaj, sanaj en la fido, la amo kaj la persistemo. 3 Ankaŭ virinoj pliaĝaj konduitu dece, ne kalumniu, ne estu sklaviĝintaj al la vino. Ili instruu la bonon, 4 por ke la pli junajn virinojn ili instruu, ami siajn edzon kaj infanojn, 5 kaj esti saĝaj, ĉastaj, diligentaj en la hejmo kaj afablaj, kaj obei la edzon. Tiam la parolon de Dio ili ne kompromitos. 6 Ankaŭ la junajn virojn vi instigu, ke ĉiumaniere ili estu saĝaj. 7 Donu la ekzemplon en bonaj faroj. Via instruado estu pura kaj serioza, 8 via predikado sana kaj nekritikinda, tiel ke la kontraŭulo povos diri pri ni nenion malbonan.

9 La sklavoj sin submetu al siaj mastroj, faru kio al ili plaĉas, ne kontraŭu ilin. 10 Ili ne trompu, sed montru sin strikte fidindaj; tiam en ĉio <kion ili faras>, la instruon de Dio nia savanto, ili gloros.

11 Ĉar aperis la graco de Dio, fonto de saviĝo por ĉiuj homoj, 12 kiu instruas al ni forlasi la malpiecon kaj la ĉi-terajn emojn, kaj vivi ĉi-monde saĝaj, justaj, kaj piaj, 13 atendante pri la esperata feliĉo, la epifanio⁵ de la gloro de nia granda Dio kaj de nia savanto Jesuo Mesio. 14 Tiu sin donis pro ni, *por liberigi nin el ĉiu malpuro, por fari nin sia popolo*, diligenta por bonaj faroj. 15 Tiel vi parolu, tiel admonu, kaj ĝustigu — plej emfaze. Kaj neniun vin malestimu.

3: 1 Memorigu ilin pri la devo submetiĝi al magistratanoj kaj aŭtoritatuloj, esti obeaj, kaj pretaj por ĉiu bona faro, 2 kalumnii pri neniun, ne kvereladi, sed <prefere> esti afablaj kaj plej mildaj en la interrilato kun ĉiuj homoj. 3 Ĉar ankaŭ ni siatempe ja estis sensciaj, malobeaj kaj submetitaj al erarado, sklaviĝintaj al ĉiaspecaj emoj kaj diversaj deziroj; nian vivon ni plenigis per malico kaj envio, malamataj kaj malamantaj nin reciproke. 4 Sed kiam aperis la boneco kaj la homamo de Dio

nia savanto, 5 Li nin savis, ne ĉar ni farintus ion kio povas justigi nin, sed nur ĉar Li estas pardonema. <Li nin savis> per la bano de l' renaskiĝo kaj de la renoviĝo de sankta Spirito, 6 kiun abunde Li disverŝis super nin per Jesuo Mesio, nia savanto. 7 Tiel, justigitaj per Lia graco, ni fariĝis heredantoj laŭ la espero de la vivo eterna. 8 Ĉi tiu parolo estas fidinda, kaj mi deziras, ke kuraĝe vi atestu pri tio, por ke, kiuj fidas je Dio, faru sian eblon esti unuaj en ĉiu bona faro. Tio estas bona kaj utila por la homoj.

9 Sed ne okupiĝu pri stultaj aferoj, genealogiaj listigoj, disputoj kaj kvereloj pri la Tora. Tiaj aferoj estas senutilaj kaj sensencaj.

10 Herezulon vi malakceptu, unu- aŭ dufoje admoninte lin, sciante, ke iu tia estas sur la malĝusta vojo, kaj pekas kaj kondamnas sin mem.

12 Post kiam Artemason aŭ Tihikon mi sendis al vi, kiel eble plej baldaŭ vi venu al mi en Nikopolo, ĉar mi decidiĝis tie travintri. 13 Ĉion preparu por la vojaĝo de Zenas, la instruisto pri la leĝo, kaj de Apolos. Nenio manku al ili. 14 Ankaŭ la niaj lernu diligente plenumi bonajn farojn, kie necesas; alie ili restos senfruktaj.

15 Ĉiuj ĉe mi vin brakumas. Brakumu ĉiujn amikojn en la fido.

La graco estu kun vi ĉiuj.

¹ Laŭlitere: presbiterojn.

² Vidu la noton ĉe Al Timoteo 3:2.

³ Heksometro en la originalo. Cito el Epimenido.

⁴ Alia traduko: Nefiduloj.

⁵ Laŭlitere: malkaŝiĝo.

KRISTANISMO

VOJAĜO AL LA MISIA DOMO

Ek de multaj jaroj mi ricevadas senpage ĉiumonate bele diverskolora presitan kajeron sub la germana titolo: „Die Wegbereiter” (La vojopreparantoj) en la formato A5. Ĝi estas prilaborata, presata kaj eldonata germanlingve en „Misia Domo” troviĝanta en la urbeto Oberderdingen-Flehingen en suda Germanujo.

Ĉiu kajero enhavas piajn preĝojn, meditaĵojn, religiajn prozojn kaj poemojn.

La monata eldonkvanto estas 10 mil ekzempleroj dissendataj tutmonde, eĉ al Ruslando en rusa traduko.

Mi estis ege scivola kiel aspektas tiu Misia Domo kaj ĝiaj anoj tiel laboreme okupitaj pri la altnivela eldonaĵo. La ĉefa redaktoro en ĉiu numero invitas gastojn por kelktagaj vizitoj en la eldonejo por mediti, aŭskulti predikojn, preĝadi kaj kanti. La Domo posedas unu- kaj mult-litajn ĉambrojn kiel modesta hotelo, sed ofertitaj senpage. Se oni volus, oni povus donaci monon al la Eldonisto „Evangelischer Missionsdienst e. V.” — Evangelia Misia Servo — registrita organizo, aŭ labori en la ĉedoma ĝardeno aŭ en la presejo.

Do mi decidis viziti la Misian Domon en tiu Flehingen proksime de Heilbronn por mem travivi du piajn tagojn en tiu ĉi kvazaŭ klostro. Mi devas konfesi ke mi estis tre scivola, kiaj ĝi kaj la vivo en ĝi aspektas. Kelkajn tagojn pli frue mi anoncis mian viziton per telefono.

Mi ekveturis sabate matene per trajno kun semajnfina bileto kaj mi kun-

prenis kiel kutime mian faldeblan bicikleton en la kofro ĉar mi havas 5 km. al mia stacidomo en Eschwege kaj la Misia Domo troviĝas 2 km. ekster Flehingen. Post kvarfoja ŝanĝo de trajnoj mi alvenis al la klostra pordo je la 15-a horo. Mi trovis la Domon facile danke al la informoj de preterpasantoj. Ĝi ja estas fame konata en la ĉirkaŭaĵo. Mi ekvidis grandegan belegan blanke pentritan konstruaĵon starantan sur deklivo en granda ĝardeno.

Malfermis la pordon la ĉirkaŭ dudekjara filo de „ĉefo”, kaj vokis sian patron. La ĉefo, sinjoro Heinrich OSTROWSKI, nomas sin „frato” kaj same per frato alparolis min tre afable kaj ordonis al sia eble dekokjara filino konduki min en mian ĉambron. Poste frato OSTROWSKI prezentis al mi sian edzinon, kiu mastrumas en la domo. Krom tio en la Domo estis helpantino: maljuna virino devenanta el Ruslando, parolanta bone germane kaj ruse. Ĉiuj tiuj personoj zorgas pri la domo, kuirejo, ĝardeno, presejo, hotelo kaj bele kantas kaj ludas diversajn muzikinstrumentojn dum la lokaj Diservoj. Oni invitis min al la vespermanĝo je la 19-a horo.

Alveninte sabate posttagmeze mi intencis unue partopreni antaŭdimanĉan Sanktan Meson en katolika preĝejo. Oni informis min, ke la Meso komenciĝos je la 18-a horo en la preĝejo troviĝanta en najbara vilaĝo, do mi ekveturis tien post supra rigardo al ĉambroj, salonegoj kaj presejo kun ofsetaj presmaŝinoj. Mi atin-

gis bicikle la preĝejon post duona horo.

Post la reveno oni invitis min al komuna vespermanĝo. Antaŭ la manĝo ĉiuj anoj de Familio OSTROWSKI tre bele pie kantis parkere kiel antaŭmanĝan preĝon dum kvarona horo. Post la vespermanĝo ili kantis denove.

Sekvontage (dimanĉe) okazis duhora Diservo en salonego kun diversaj muzikinstrumentoj gvidita de Henriko OSTROWSKI. Ni kantis kaj preĝis germanlingve laŭ la Diserva preĝlibro germanlingva. Nian kantadon akompanis la ludo de diversaj instrumentoj far de kvar gejunuloj de familio OSTROWSKI. Tiuj gejunuloj majstre regis orgenon, trumpeojn, harpon, gitaron, cimbalon. Kelkfoje ili kantis ankaŭ sole kaj ni aŭskultis.

Post tagmanĝo mi revenis trajne hejmen al Eschwege treege impresita de alt-nivelaj spiritaĵoj travivaĵoj.

Ĉe adiaŭo mi postlasis monsumon kiel donacon por la disvolvigo de Misia Domo — rekompenco de gastigado de mia persono.

Se leganto dezirus pli da informoj pri tiu Misia Domo kaj ĝia agado, li skribu al:

Evangelischer Misionsdienst
„DIE WEGBEREITER“

DE-75038 Oberderdingen-Flehtingen.

Jozefo WOZNICZKA



„Esperanto — la nova latino de la Eklezio“ en la angla

Saluton!

Ĝus mi enretigis la anglan tradukon de la libro „Esperanto — la nova latino de la Eklezio“ fare de Maire Mullarney kaj Mike Leon:

Esperanto — The New Latin for the Church and for Ecumenism

<http://home.t-online.de/home/ Ulrich.Matthias/latin_en.htm>

Mi planas ankoraŭ iom plilabori la tradukon, farante ankaŭ kelkajn enhavajn modifojn, kaj ŝatus sendi ĝin en februaro al FEL, kiu eldonos la libron en printempo 2002.

Amike

Ulrich Matthias



RADIO VATIKANA

La jarkomenco alportas du novaĵojn el la E-redakcio de RV.

1) Ni ĝojas informi ke ekde nun ankaŭ niaj elsendoj de la 2a eŭropa reto de RV (t.e. tiuj de merkredo kaj ĵaŭdo) surondiĝas per satelito.

Oni povas aŭskulti ilin per la digitalaj frekvencoj de „Telepace“, aŭdkanalo 2 („angla lingvo“).

Eutelsat Hot Bird II, 13° Oriente

Frekvenco: 11.804 GHz

Polarizo: Vertikala

Symbol Rate: 27.500

FEC: 2/3

Bouquet: RAI

Kanalo: Telepace

Kiel konate, la dimanĉaj elsendoj estas jam delonge elsendataj ankaŭ satelite:

Eutelsat Hot Bird 2 (13° Oriente) transponder 54 (Bouquet Rai), vertikala polarizo, frekvenco 11804 Mhz, aŭd-kanalo je 128 Kbit/s SR 3320 - Audio 660

2) En la oficialaj TTT-paĝoj de Radio Vatikana estis enkondukita sekcio pri la elsendoj en esperanto: www.vaticanradio.org

Korajn salutojn!
E-programo RV

EKUMENA DISERVO DUM LA IFEF-KONGRESO

Ekde la 12-a ĝis la 19-a de majo 2001 kunvenis en Tábor (CZ) proks. 200 esperantistoj-fervojistoj pro la IFEF-kongreso. Enkadre de ĝi okazis dimanĉe la 13-a de majo posttagmeze Ekumena Diservo en la Preĝejo de Diaj batalantoj apartenanta al la Ĉeĥoslovaka Husana Eklezio. Kunestis pli ol 100 partoprenantoj. La Diservon gvidis komune katolika pastro Josef Xaver KOBZA (kiu ankaŭ predikis pri amo surbaze de la evangelio laŭ sankta Johano kaj ne forgesis dume trafemencii Esperanton) kune kun pastoro de Ĉeĥoslovaka Husana Eklezio Eva CERVENA kaj laika helpo de Radka KRIVANKOVA, kiu reprezentis la Ĉeĥfratan Evangelikan Eklezion. Tiamaniere reprezentantoj de tri plej multnombraj eklezioj en Ĉeĥio kunagis dum la Diservo. Krom kutimaj komunaj kantoj oni povis ĝui ankaŭ du solokantojn de operkantistoj Katerina KUDLIKOVA (soprano) kaj Miroslav SMYCKA (tenoro).

Post la fino de la Diservo la loka pastorino Eva CERVENA ebligis al la ĉeestantoj konatiĝi ankaŭ kun la ceteraj ĉambroj en la konstruaĵo, inkluzive la specialaĵon de la husana eklezio, kolumbario en la preĝejo, en Tábor la dua plej granda enĉambro en Ĉeĥio. Eble konvenas klarigi, ke ĉe plejparto de la husanaj preĝejoj troviĝas ankaŭ kolumbarioj (urnejoj), do la restaĵoj de la forpasintoj troviĝas en la loko, kie oni kunvenadas por komune preĝi.

Petro CHRDLE

PRI MALESPERO

Malesperi signifas ĉesi ligojn kun la ĉirkaŭa mondo, kaj ne havi komuniigon kun la Fonto de nia vivo, Dio.

„Mi ne volas vivi, mi ne havas intereson de la vivo kaj ne estas en ĝi ia senco“ — la vortojn oni povas aŭdi de la homo, kiu malesperas. La malvirto estas tiam, kiam necesas preĝi kontraŭ ĝi persiste, senĉese. Pri tio nia Savanto instruis nin en la Evangelio (Luko 18: 1): „Oni devas ĉiam preĝi kaj ne laciĝi“.

Adaptita de Larisa KUZMENKO

PREĜO PRI PACO DE LA TUTA MONDO KAJ EDUKADO DE LA POPOLOJ SUR LA TERO

(la preĝo de la plej respektinda Silvano la Afona)

Sinjoro, donacu pacon vian al viaj homoj.

Sinjoro, donacu Spiriton vian Sanktan al Viaj sklavoj por ke Li varmigu iliajn korojn per Via amo kaj direktu ilin por ĉiu bono kaj vero.

Sinjoro, donacu al ili vian gracon, por ke ili en la paco kaj amo eksciu Vin kaj ekamu Vin kaj diru tion al la apostoloj sur la favoro: „Bone estas Sinjoro, kun Vi“.

Varmigu malĝojan korojn de la homoj, ili gloru Vin en ĝojo, forgesinte pri la teraj malĝojoj.

Konsolanto bona, ploreme ni petas vin, konsolu malĝojajn animojn de viaj homoj, eksciu al ili vian amon kaj dolĉecon de la Sankta Spirito, permesu al ili forlasi ĉion malbonan kaj permesu al ili renkonti Vin ameme, permesu al homoj vivi en paco, plenumante Vian volon por Via gloro. Amen.

Adaptita de Larisa KUZMENKO

...REKTE, KURAĜE...

Karaj legantoj kaj nelegantoj de la revuo de UEA,

Kiam antaŭ kelkaj monatoj mi diris, ke mi ne volas esti prezidanto de UEA sed de ĉiuj esperantistoj, la reagoj estis malsamaj, kaj ne mankis kelkaj sinceruloj, kiuj, surbaze de simpla laŭvorta kompreno, ŝoke konstatis, ke tio estas okazo de antaŭanoncita diktaturo. En la realo mi volis diri, kaj praktike ĉiuj komprenis, ke UEA respondecas al ĉiuj esperantistoj, ĉu membroj, ne-membroj aŭ duon-membroj, kaj ke ĉiuj esperantistoj estas samvalora parto de nia komunumo sendepende de la ekonomia farto de la landoj, en kiuj ili vivas.

Pro tio mi sendas same varmajn salutojn al la nelegantoj de la revuo de UEA. Mi provos alirime atingi ilin, sed ĉies helpo pri la diskonigo de ĉi tiu saluto estas bona.

Novjaraj mesaĝoj kaj kongresaj rezolucioj estas tre malfacilaj tekstoj, ĉar kutime ili konsistas el tro roz-kolora pentrado de la realo kaj el listo de plenumindaj agadoj fare de movado, kiu apenaŭ kapablos plenumi ilin. Ni ĉiuj scias tion, sed kial ĝeni la festan etoson?

Ni provu ĉi-foje alian vojon. Ni provu esti malpli roz-koloraj.

La movado en ekonomie riĉaj landoj baraktas iom pli ol kutime. Se vi rigardas al la membronombroj en Usono, Italujo, Germanujo ktp., vi vidos, ke la nombroj emas je falo kaj „stagnas” nur en tiuj landoj, kie agema estraro ageme kontraŭbatalas.

Ĉu temas pri vera krizo? Mi ne scias. Ĉiutage dekoj da komencantoj, komen-

cas lerni Esperanton rete ekster kiu ajn tradicia kurso, kaj abrupte aperas en ret-listoj per tiaj amindaj mesaĝoj: „mi komenci lerni Esperanto pasinta sabato...”

Aliflanke, ĉiuj scias, kiom malfacile estas en tradicia kurso igi kursanon esperantisto. En la kazo de retaj komencantoj, tio estas praktike nebla — kial reta kurs-fininto volu pagi membro-kotizon al organizaĵo? Sufiĉas al li aŭ ŝi klaki sur kelkaj TTT-eroj por trovi multon pli ol oni povas legi.

Nur kelkaj „stranguloj”, kiuj volas sperti vivan paroladon, rigardante la kunparolanton en la okuloj, en la fino trovas „la esperantistojn”.

La movado en ekonomie malriĉaj landoj estas en progreso pli ol kutime kun ĉiuj siaj apartaĵoj (je kiuj eŭropanoj komencas al kutimiĝi). Brazilanoj, irananoj, kubanoj, kolombianoj, vjetnamoj, estas pli kaj pli multenombraj kaj aktivaj. Aliflanke, jen plia problemo, ili malfacile trovas sian lokon en organizaĵoj, kiuj estas pensitaj kaj ĝis nun agorditaj por okcidentaj mez-klasuloj. Ne temas nur pri UEA, sed pri ĉiuj Esperanto-organizaĵoj (inkluzive de la plej maldekstraj kaj revoluciaj).

Ĉi tiuj du supraj konstatoj, laŭ mi, estas la strukturaj kialoj de granda parto de niaj nunaj problemoj. Tamen ne temas nur pri problemoj sed eble ankaŭ pri mirindaj oportunaĵoj, se ni kapablos utiligi ilin.

Ni devus esti kontentaj, ke Esperanto eniris tre bele en la bravan novan teknologian mondon. Ni devus tre mul-

te danki ĉiujn tiujn kreantojn de paĝoj, de kursoj, de tekstoj en la reto. En ĉi tiu okazo nia movado pruvis sian kapablon adaptiĝi al novaj situacioj en mirinda maniero.

Nun simple niaj „tradiciaj” strukturoj devus starigi al si la problemon, kiel utiligi ĉi tiun abundan aktivadon kaj igi ĝin integra parto de la movado.

Kompreneble ni devas esti kontentaj ankaŭ pri la pliiĝo de esperantistoj en ĉiuj landoj de la mondo, kvankam tio povas kaŭzi problemojn por la establiĝintaj rutinoj kaj financaj fluoj. Ĉu finfine nia celo ne estas disvastigi Esperanton ankaŭ al Etiopujo? Kiu decidis, ke etiopoj estas tro malriĉaj por Esperanto? Mi ĉiam demandis kaj ankoraŭ demandas min, kial „noktaj fantomoj” ne atakas la trankvilan dormon de niaj estraranoj, respondeculoj, ĉef-ĝeneralaj gvidantoj, kiam Esperanto ankoraŭ malĉeestas en Etiopujo, Indonezio, Filipinoj, Paragvajo...

Kaj cetere, parolante pri pozitivaj, ni ne forgesu, ke la sinteno de lingvistoj kaj sciencistoj al Esperanto neniam estis same objektiva kiel nun.

Mi ne volas citi anekdotojn aŭ personajn travivaĵojn, sed mi renkontas ĉiam malpli da tiuj komptaj, supercaj ridetoj, kiuj kutimis saluti iun ajn aludon je Esperanto. Tio unuflanke estas ĝojiga sed aliflanke devas instigi nin ĉiam je alta nivelo la sciencan agadon pri/por Esperanto. Unu soci-lingvistika aŭ esperantologia verko devus same valori kiel unu poemo de enamiĝinta komencanto.

Do, se ĉio plejbonas en la plej bona mondo, ŝajnas tute senbaza tiu fenomeno de „idea rezignismo” kiu atakas partojn de la malnova movado. Esence, eble temas pri la jeno: ni, la esperantistoj, diras, ke la popoloj faru en konsento unu grandan rondon familian. La aliaj diras

ke ne, ke la rondo ne estu farata en konsento sed laŭ la reguloj de la Monda Komerca Organizaĵo, kaj ke ĝi ne estu familia, ĉar iuj estas regantoj kaj iuj regatoj.

Ĉar multaj kredas je tio, ankaŭ ni kredis je tio (la psikologia premo en multaj landoj estas tro granda, por ke oni ne konkludu tion). Sekve ni serĉu por ni ian pli facilan niĉon, en kiu ni povos debati inter ni pri ni kaj pri niaj pasintaj glorioj for de la granda, freneza mondo.

Ne, karaj geamikoj, ni ne devas fuĝi el la mondo sed vivi en ĝi kaj al ĝi proponi nian solvon, nian vizion kaj la valorojn, kiujn ni efektive sukcesas praktike realigi.

La ideoj pri merkato kaj senkompata venko de la plej forta estas baze kontraŭaj al niaj ideoj. Ni volas mondon justan kaj plurcentran. Ni humile estas la malhumilaj heredantoj de pluraj granduloj: ZAMENHOF mem, kies kongresaj paroladoj estas daŭre relegindaj por kompreni ĝis kiu grado ni rifuzas militon kaj perforton, E. PRIVAT, I. LAPENNA, kaj longa listo da aliaj, kiujn mi ne povas nun plene mencii.

Ni estas ankaŭe kaj ĉefe la senmeritaj heredantoj de generacioj da esperantistoj, kiuj batalis, baraktis kaj esperis tra unu el la plej tragediis jarcentoj, la pasinta. La heroaĵoj pli aŭ malpli grandaj kaj la solidarecaj agoj faritaj de niaj antaŭuloj trapuntas ĉiujn kontinentojn kaj ĉiujn jardekojn. Memorigi pri kelkaj estus nejuste, sed eble iam iu volos verki verkon pri la „lingvo de solidareco”.

Ni estas, do, la fieraj Esperanto-movado, kiu dum pli ol unu jarcento faris sian laboron por interkompreniĝo kaj paco sen pagoj kaj sen dankoj, dum la oficialaj instancoj, pagate kaj laŭdate, ofte faris, kaj ankoraŭ nun faras, la malon. Ĉiukaze ni ne havas ion ajn por timi el la kom-

William Auld donacis sian Esperanto-bibliotekon (librojn, presaĵojn, kolektojn ktp.) al la Nacia Biblioteko de Skotlando. D-ro Brian Hillyard, fakestro pri raraj libroj, akceptis oficiale la donacon dum malgranda ceremonio la 7an de decembro. D-ro Hillyard esperas, ke en la daŭro de 2002 oni povos publikigi per interreto la liston de la disponebla materialo.

Pli ol sesdek esperantistoj kaj parencoj festis la donacinton en lia hejmo, en vilaĝo Dol-lar norde de Edinburgo. Per admirinda mastrumado Meta, la eterne ĉarma edzino de Bill, kronis sian grandan sindediĉon al nia verkisto, kiu lastatempe trankvile konvaleskas post milda apopleksio.

Heroldo komunikas

19-A INTERNACIA FESTIVALO

Festu jarfine en kastelo

19-a Internacia Festivalo en Borken-Gemen,
27 dec 2002 - 3 jan 2003

La plej fama aranĝo por personoj 25-55 jaraĝaj

Poŝtadreso: Hans-Dieter PLATZ

Postfach 1148

DE-34303 NIEDENSTEIN

Telefono kaj fakso-numero: +49 56 24 80 07

Poŝtelefonnumero: +49 171 496 45 58

Retpoŝto: <HDP@internacia-festivalo.de>

TTT-paĝo: <<http://www.internacia-festivalo.de>>

Internacia Festivalo ofertas al vi specifan programon por mezaĝuloj (dua generacio) kaj junaj familioj kun aŭ sen infanoj. IF okazas sub profesinivela gvido kaj kunvenigas ĉiujare ĉ. 200 personojn. IF estas aranĝo por lingve spertaj personoj, kono de Esperanto kaj ĝia uzo estas necesaj, sed laŭdezire ni ofertas paroligajn kursojn, ekzemple por via partner(-in)o. Ni proponas varian programon, t.e. matene kaj posttagmeze altnivela prelegoj pri kadra kaj aliaj temoj, kursoj, urbaj vizitoj kaj promenoj, vesperfolkloro, muziko, koncerto kaj danco.

Nia programo komenciĝas la 27-an de decembro per la interkona vespermanĝo, programfino la 3-an de januaro post matenmanĝo.

La plilongiga tago finiĝas la 4-an de januaro, same post matenmanĝo.

Estas apartaj dumtagaj programeroj por infanoj (aĝo-grupoj 3-7 kaj 8-14 jaraĝaj) sub gvido de fakaj kunlaborantoj, gepatroj povas do senĝene ĉeesti la prelegojn. Laŭeble infanoj havu lingvajn

Ilia lingvo estas kulturlingvo

La plej grava ĵurnalo en Svedio, **Dagens Nyheter**, raportis sur duona paĝo la 2-an de novembro pri Esperanto-seminario en Upsalo, pri la uzo de interreto. Samtempe oni rete publikigis kaj la svedan originalon, kaj esperantlingvan tradukon de la artikolo. Oni rete disponigas al la legantoj mallongan kurson de esperanto. Vidu <www.dn.se/esperanto>.

Sur la unua paĝo aperis foto de Katja IGNATIEVA (Cheboksary kaj Västerås); sur la interna paĝo grandaj fotoj de Hokan LUND-

KONFERENCO DE NATURKURACISTA ASOCIO!

Internacia Naturkuracista Asocio (INA), ĝis nun iom dormeta, decidis enkonduki elementojn de profesia laboro. Laŭ la decido de ties prezidanto, s-ro Chong Puramo, estis enkondukita parte salajrata sekretario. Tio jam plivigligis la INA-estaron kaj aperis decido okazigi kelktagan konferencon por nevenontoj UK-n en Brazilio. Des pli, ĉar enkadre de UK-oj ne sufiĉas da tempo por fundaj diskutoj. Antaŭstaras refari la statuton kaj levi la INA-laboron sur pli altan nivelon.

Unuan fojon, ekde la fondiĝo, la Interna-

konuojn en Esperanto.

Subtrijarulo(-in)o estas senkotizaj, sed la gepatroj mem okupiĝas pri ili (manĝo kaj prizorgo). Laŭdezire disponeblas infanaj litetoj en limigita kvanto.

Nia kadra temo

DIO KAJ LA MONDO — religioj kaj politiko

Religiaj tradicioj kaj konvinkoj mult-

BERG (Stokholmo), Katja IGNATIEVA, Camelia POP (Rumanio) kaj Ognjen PETROVICH (Jugoslavio). La artikolo rompas malnovan negativan tradicion de la sveda gazeto, kiuj ofte skribis stereotipe pri homoj, „kiuj volis pacon, sed fiaskis, ĉar daŭre okazas militoj”. La nuna artikolisto, Anders STEINVAL, raportas serioze kaj trankvile pri lingvo kaj kulturo.

La okazon proponis la seminario organizita de TEJO, kun la partopreno de 35 personoj, ĉefe el Eŭropo, sed ankaŭ el Norda Ameriko.

Heroldo Komunikas n-ro 142

cia Naturkuracista Asocio organizas 6-tagan Konferencon en Eŭropo (19-24.08.2002 en Krefeld, Germanio). Estas invitataj ne nur INA-membroj sed ankaŭ ĉiuj, kiuj opinias naturkuracadon estonto de la medicino kaj kiuj volas scii detalojn de sana senmedikamenta vivmaniero. Eblos preni seancojn de naturkuracado por pluraj malsanoj. Detaloj ĉe INA-sekretario: Anatolo GONĈAROV, p/k 65 Sankt-Peterburg, RU-197022, Rusio.

Dankante pro la helpo

Anatolo GONĈAROV
anatolog@mail.ru
Interredaktore

maniere influas politikajn evoluojn kaj decidojn. Aliflanke religioj pligraviĝas en situacio de politika necerteco aŭ politika premo. Kiel funkcias la interrilatoj? Kiun signifon havas religioj en nia moderna mondo? Ĉu religioj taŭgas por solvi politikajn konfliktojn?

Vi povas aliĝi rete: <http://www.internacia-festivalo.de/aligouni.html>

Lasta informo (7 januaro 2002): Jam aliĝis 81 personoj el 12 landoj.

POST FORTALEZO KAJ GOTENBURGO, UK IROS AL PEKINO KAJ VILNIUSO

La Estraro de UEA, kunveninta en Roterdamo 11–13 de januaro 2002, interalie decidis principe pri la estontaj Universalsaj Kongresoj.

Por 2004 la Estraro akceptis la inviton de Ĉina Esperanto-Ligo okazigi Universalan Kongreson en Pekino. Oni antaŭvidas subtenon de la ĉina registaro kaj entuziasman kunlaboron de la ĉinaj movadanoj.

Por 2005 estis akceptita la invito de Litova Esperanto-Asocio. Tiam la 90a Universal Kongreso de Esperanto gastos en la ĉefurbo de Litovio, Vilnius. Ĉar en 2005 estos la centjara jubileo de la 1a UK (tamen ne temos pri la 100a UK, ĉar en kelkaj jaroj la kongresoj ne okazis pro la mondmilitoj) oni antaŭvidas specialan antaŭkongresan programon en Bulonjo-sur-mar, Francio. Bulonjo mem estas tro malgranda por gastigi modernan UK-on.

Siaflanke Litovio, proksime ligita kun la historio de Esperanto, kun elstare amasa Esperanto-movado, prezentas tre favorajn kondiĉojn kaj ŝtatan subtenon.

Interredaktore

Informoj el la C.O. de UEA

ZAMENHOFOLOGIA SEMAJNFINO ĈE KCE

Ju pli oni studas la zamenhofan parton de la verko orientita al hilelismo kaj homaranismo, des pli oni ekkonscias la riĉan kompleksecon de tiu penso, kiu resendadas nin samtempe al la tiamaj epokoj kaj zamenhofa vivo, sed ankaŭ al la nunaj Esperantio, individua identeco kaj ekstera mondo.

Okaze de la centjara datreveno de la ruslingva broŝuro „Hilelismo” kaj de la letero al KOFMAN, Giorgio SILFER prezentis tiun etapon de la penso zamenhofa kiel la plej radikalan, pro ĝia signifo: „Esperantistoj el ĉiuj gentoj formu unu popolon, esperantistoj el ĉiuj religioj unuiĝu”.

Ne konsentis Francisko DEGOUL, al kiu la plej radikala elpaŝo ŝajnas ne tiu transdono de la alvoko el la judoj al la tuta esperantistaro, sed la lasta invito, kiu en 1913 alvokas al unuiĝo ne nur esperantistojn sed "ĉiun, kiu aprobas la ideon" de homaranismo.

Walter ŜELAZNY siaflanke insistis pri la strangaj konverĝoj inter la zamenhofa vidpunkto kaj la penso de novliberaluloj en Nord-Ameriko, kiaj estas RAWLS kaj KYMLICKA. Por ili libereco valoras nur kondiĉe, ke per ĝi ne okazu malavantaĝoj al malpli favorataj homoj, kiel ajn ili troviĝu minoritataj en la socio.

La zamenhofologia semajnfino ĉe Kultura Centro Esperantista altiris partoprenantojn el Bulgario, Francio, Italio kaj nature Svislando.

Heroldo komunikas

EDUKADO

IKUE EN KOMÁRNO—FAKULTATO

Mesaĝo al la reta listo IKUE

Estimatoj!

Karaj amikoj!

La Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) San Marino, kies prezidanto mi momente estas, planas starti jam en la unua septembra semajno 2002 interkulturan universitaton en la bela urbo Komárno, kiu situas ambaŭflanke kaj de la Danubo kaj de la slovaka-hungara ŝtatlimo. La universitaton komence kon-

LA 14-AN DE DECEMBRO ESTIS LANĈITA LA RETEJO „EDUKADO.NET”!

Mi nun persone invitas vin al la vizito de la paĝaro, aŭ pro tio, ja vi ĉeestis la planadon, aŭ ĉar iusence vi kontribuis al la kreado sendante librojn, sugestojn kaj konsilojn...

Bonvolu rigardi nian laboron kaj lasi mesaĝon en la gastlibro de la paĝaro, helpante nin per viaj konsiloj kaj opinioj. Se la paĝo montriĝas utila kaj populara servo, estas granda ŝanco ke ESF financos ĝian pluan konstruon. Se ankaŭ vi volas tion, esprimu vian konsenton (Ili decidis pri la subvencio en la unuaj tagoj de januaro).

Kaj nun ni tondus la rubanon, bonvenon en la retejo de Esperanto-instruistoj kaj lernantoj: <<http://www.edukado.net>>.

Salutas vin el al nomo de la teamo:

Katalin KOVATS (eks: SMIDELIUSZ)

<katalin.kovats@wanadoo.nl>

Interredaktore

stituu tri fakultatoj:

— bazosciencia fakultato, kiu priokupiĝu unuavice pri sciencreviziaj laboroj kiel ekz. plurlingvaj terminologioj, enciklopedioj, sciencistorio ktp.,

— fakultato pri kulturprotektado kaj eŭrologio (en ĝi estas planita la instruado al estontaj instruistoj en la 7 minoritataj lingvoj agnoskitaj en la slovaka respubliko) kaj

— fakultato por interkultura dialogo.

En ĉi tiu tria fakultato temu laŭ nia espero unuflanke pri trtadukado el klasikaj lingvoj de mondreligioj en modernajn lingvojn kaj pri kompara religiscienco, aliflanke pri teorio de tradukado, interlingvistiko kaj instruado al tradukistoj skribaj kaj buŝaj inter la lingvoj de la Eŭropa Unio inkluzive la por ĝi proponitaj neŭtralaj lingvoj (la Latina, la Internacia Lingvo de Doktoro Esperanto kaj, kiel ankoraŭ diskutata, eventuala variaĵo de ĝi, la „Europa”).

La unua iniciato al la tria fakultato venis el laŭŝajne monhava institucio por tradukado de la Biblio el al malnovgreka kaj la hebrea lingvoj. Analogaj kontaktoj al judaj kaj muslimaj kleruloj liberalaj same kiel al la tri veturiloj budhismaj estas planataj. Laŭ mia konvinko la tuta fakultato nur havas sencon, se ni sukcesos partoprenigi ankaŭ klerulojn, kiuj reprezentas la oficialajn esperantistajn grupigojn de la diversaj religioj kaj konfesoj, do unuavice IKUE, kiu ŝajnas al mi la plej forta de ĉiuj tiuj grupigoj.

Nia ĉefcelo, ebligi dialogon anstataŭ batalon inter la religioj, ja konformas al

6a SESIO DE INTERLINGVISTIKAJ STUDOJ

La trijaraj postdiplomaj Interlingvistikaj Studoj en Universitato Adam Mickiewicz, Poznań (Pollando) atingis la unuan fojon sian lastan — t.e. sesan — sesion (26–30.01.2002).

La unusemajna sesio en ĉiuj semestroj kunvenigas la internacian partoprenantaron (el Ĉeĥio, Germanio, Belgio, Makedonio, Svedio, Usono kaj Pollando) por aŭskulti superrigardajn prelegojn pri interlingvistiko, esperantologio kaj ĝenerala kaj aplikata lingvistiko. En ĉiu semestro unu-du konataj kaj elstaraj eksterlandaj fakuloj estas invititaj por gvidi kursojn.

Ĉi foje Dr hab. Detlev BLANKE (Humboldt Universitato, Berlin, DE) prelegis pri la nuntempa stato de interlingvistiko kaj ĝia rolo en eŭropa lingvopolitiko, krome prezentis la terminologian aga-



la idealo de la piaj esperantistoj el ĉiuj religioj.

Bedaŭrinde al mi mankas la necesaj kontaktoj al kunlaborpretaj kaj fake kaj lingve kunlaborkapablaj personecoj el IKUE. Ĉu vi povas helpi al mi — preferu tuj per plusendado de ĉi tiu mesaĝo al kompetentaj sciencemuloj el via movado? Aŭ ĉu vi opinias, ke la ideo estas senutila?

Anticipe dankante, vin tre afable salutas via

Prof. Dr. habil. Helmar FRANK

NDLR: Ĉu pri tio ankaŭ KELI havus forton?

don de WÜSTER. Prof. Humphrey TONKIN (Universitato de Hartford, US) donis superrigardon pri la Esperanto-movado de la komencoj ĝis nun ĉerpante ankaŭ el siaj riĉaj travivaĵoj. Aliajn 8 horojn li dediĉis al la analizo de esperantaj poemoj.

La unuaj tagoj estis malfermitaj al pli granda publiko. Tiel alvenis ankaŭ Georgo HANDZLIK, kiu kantis al la partoprenantoj kun gitarakompano lunde vespere, post la scienca programo, dum la tradicia ĉina vespermanĝo ĉe Tintilo kaj Joakimo WERDIN.

La sesio estis tre sukcesa. Pri ĝi raportis regionaj radiostacio kaj televido WTK. La televida stabo filmis fragmenton el la kurso de BLANKE, intervjuis TONKIN kaj partoprenantojn, poste invitis Ilona KOUTNY, la gvidantinon de la Studoj por enstudia interparolo. Entute 10 minutoj de la vespera novaĵprogramo estis dediĉita al la eŭropa lingvoproblemo, Esperanto kaj interlingvistika sesio.

La direktoro de la Lingvistika instituto invitis la prelegantojn por tagmanĝo. TONKIN kaj KOUTNY renkontiĝis ankaŭ kun vicrektoro de UAM en agrabla etoso kaj interparolis i.a. pri eventuala kunlaboro en la tereno de interkultura komunikado.

Dr Ilona KOUTNY, membro de AĉE gvidanto de Interlingvistikaj Studoj
Lingvistika Instituto,

Adam Mickiewicz Universitato
Międzychodzka 5, PL 60-371 Poznań

tel.: +48 61 829-27-09

tel./fakso (sekr.): +48 61 829-27-00

ELDONADO

INAŬGURITA LA BIBLIOTEKO DE INTERLINGVISTIKO EN MILANO

360-paĝa katalogo en formato A4, konsultebla ankaŭ rete, estas la impona rezulto de la laboro de Andreo MONTA-

HILELISTO

Ĝus aperis la 25-a numero de la internacia (esperantlingva) versio de Hilelisto. Ĝi estas legebla laŭ TTT-adreso:

<http://geocities.com/hilelista_komunumo/hilelisto25.htm>.

Ĉiuj ĝisnunaj numeroj de Hilelisto estas, pere de retligiloj, legeblaj de sur TTT-paĝo:

<http://geocities.com/hilelista_komunumo/hilelisto.htm>.

Aŭtomata abonilo je la internacia (esperantlingva) versio de Hilelisto havas TTT-adreson:

<http://geocities.com/hilelista_komunumo/abonilo.htm>.

Ĝus aperintaj numeroj 1 kaj 2 de la kroatlingva versio de Hilelisto estas legeblaj laŭ TTT-adresoj:

<http://geocities.com/hilelista_komunumo/hilelist1.htm>,

<http://geocities.com/hilelista_komunumo/hilelist2.htm>.

TTT-adreso de Kroata Hilelista Komunumo estas:

<http://geocities.com/hilelista_komunumo/hhz>.

Mato SPEKULJAK

GNER, kiu dum du jaroj prizorgis la Bibliotekon de Itala Interlingvistica Centro, nun gardata de la Lingva Fakultato de milana Universitato.

La Bibliotekon oficiale inaŭguris Fabrizio PENNACCHIETTI, profesoro pri interlingvistiko kaj esperantologio en la torina universitato, Tiziana ROGORA, prezidantino de IIC, kaj Giorgio SILFER, membro de la scienca komitato de IIC, en la ĉeesto de la akademiaj aŭtoritatoj.

Sen. ROGORA skizis la historion de la biblioteko, fondita kun la Centro mem en 1985, kaj dum pli ol dek jaroj gardita en Cernusco, apud Milano. Prof. PENNACCHIETTI retrospektivis kaj perspektivis pri la universitata instruado de interlingvistiko kaj esperantologio. D-ro SILFER prezentis la evoluon de la nova sciencobranĉo en Italio, de Alessandro BAUSANI ĝis Umberto ECO.

La universitato kunlaboros kun Itala Interlingvistika Centro por pliaj projektoj, favore al la scienca studo pri esperanto.

Heroldo komunikas

250 ĈE PRELEGO EN VERONO

Okaze de la ZAMENHOF-tago, la 15-an de pasinta decembro, 250 lernantoj kaj docentoj de la Eŭropa Lingva Liceo en Verono (Italio) kunvenis por debati pri Esperanto kaj pri Eŭropa Unio.

Inter aliaj, prelegis la Urba Skabeno pri Komunumaj Politiko, Patrizia MARTELLO, kaj la Estrarano de IKUE, Serio BOSCHIN.

Verono, urbo de la Ŝekspira (Shakespeare-a) am-teatraĵo Romeo kaj Julieto, gastigos venont-aŭguste la Eŭropan Esperanto-Kongreson.

LA UNUA ESPERANTO-SIMFONIO JAM HAVEBLA KOMPAKTDISKE!

[Ashburn, Virginio, Usono, la 19an de januaro 2002]

La muzikfirmao „Verda Stelo Music” fieras anonci, ke la longe atendita orkestra kompaktdisko kun la unua Esperanto-simfonio (de la usona komponisto David GAINES) jam haveblas por aĉeti. La usona firmao „MMC Recordings” eldonis la KD, kio enhavas ankaŭ la koncerton por eufonio (tenora tubjo) kaj orkestro de D-ro GAINES. Oni povas trarigardi kaj aĉeti la diskon ĉe la TTT-ejo de „MMC Recordings” ĉe <<http://www.mmcmusic.com>>.

Eventuale la KD haveblos ankaŭ ĉe la kutimaj grandaj vendejoj por klasika muziko tutmonde, kaj ankaŭ ĉe E-movadaj libroservoj. La KD kostas po USD 14,95.

Netigita kiel doktoriĝa disertacio en 1998, la Simfonio N-ro 1 („Esperanto”) por mezsopranulino kaj orkestro de D-ro David GAINES estis registrita de la Moravia Filharmonika Orkestro de Ĉeĥio sub la gvido de dirigento Vít MICKA, kun kantistino Kimball WHEELER, en oktobro 2000. Jen la unua simfonia muzikaĵo por orkestro iam ajn komponita uzanta tekston en la internacia lingvo Esperanto!

La usona komponisto David GAINES estas rekonita internacia kaj pro lia muziko kaj pro lia entuziasma reklamado de la muziko de aliaj usonaj gekomponistoj per la internacia lingvo Esperanto. Li estis gastkomponisto ĉe la Universitato de York en Britio, la Rejkjavika Konservatorio en Islando, kaj la In-

ternacia Muzik-Seminario en Stara Zagora, Bulgario.

D-ro GAINES posedas diplomojn de la usonaj universitatoj Northwestern University, American University, kaj la Peabody-Konservatorio de Muziko de Johns HOPKINS University. Inter liaj honoroj estas la Unua Premio en la kanto-branĉo de la 1995-aj Belartaj Konkursoj, pro lia korusa kanto „Povas plori mi ne plu”.

Por pli da informo pri la simfonio aŭ pri alia muziko de David GAINES, turnu vin al <<http://www.davidgaines.org>> aŭ <<http://www.mmcmusic.com>>, aŭ skribu al <info@davidgaines.org> (Esperante) aŭ <info@mmcrecordings.com> (anglalingve).

Gazetara kontakto (Esperantlingve):

D-ro David GAINES,
Verda Stelo Music
21274 Smokehouse Court,
Ashburn VA 20147-5316, USONO
011.01.703.723.1777 — telefono
011.01.703.723.1650 — telefakso
<info@davidgaines.org> — retpoŝte

Interredaktore

Gazetara Komunikado LA KVARA INTERNACIA FOTOKONKURSO

„La Ondo de Esperanto” organizis en 2001 la kvaran Internacian Fotokonkurson. En la konkurso partoprenis 46 fotoverkoj de 15 aŭtoroj el 10 landoj: Britio, Ĉeĥio, Finnlando, Francio, Hungario, Italio, Jugoslavio, Litovio, Pollando, Ruslando.

La 18an de januaro 2002 la juĝkomisiono anoncis la rezulton.

1a PREMIO: Anna SKUDLARSKA (Pollando) pro „Estimo” kaj „Revo”.

„ORAJ KANTOJ” APERIS

En la Esperanto-movado estas aparte bonfama la etoso de rusiaj E-aranĝoj, parte ankaŭ pro la tiea kutimo pri oftaj kunaj kantadoj (en koncertoj, ĉe lignofajroj ktp.)

Teamo de REU kolektis la plej konatajn, plej ŝatatajn kantojn de la lastaj jaroj (jardekoj), kaj decidis eldoni ilin en kompaktdiskoj sub nomo de „Oraj kantoj”.

La studian registradon kiel kantistoj en oktobro 2001 en Tihvin partoprenis Marija KOĈETKOVA, Evelina SOKOLOVA, Sonjo ŜEJNINA, Svetlana USANOVA, Grigorij AROSEV, Mikaelo BRONŝTEJN, Oĉjo DADAEV, Vitalij MALENKO, Andrej Obrezkov, Aleksandr Osokin, Mikaelo POVORIN; kiel gitaristoj – Maksim KABLUKOV, Andrej OBREZKOV, Mikaelo POVORIN, Marija KOĈETKOVA. La rezulto estas jena:

„Oraj kantoj — 1. Ni renkontiĝos” — 49 minutoj, 19 kantoj (Din-Don, Sezonoj, Aŭtuno, Ciganeska, Valso en ritmo de pluvo, Kanto de mulisto, Oh, rajdis, rajdis, Vagadi sencele, Revas mi, Ural', Drink-kanto, Que sera, sera, Revelacio,

Dona-Dona, Birdeca bird', Zimbabve, Vivu la stel', Ju-pi-ja, Ni renkontiĝos).

„Oraj kantoj — 2. Amata lando” — 46,5 minutoj, 19 kantoj (Amata lando, La tempo somera, En tendar', Ni vojaĝas, Kanto pri SEJT, Oriento, Tra tuta mond', Mia amatin', Nokto ploras, Ne lasu min, Estas bela vi, knabin', Karteta dometo, Komentantoj, La renkonto, Somera mondo, Ne, ne, ne, Tendaraĵoj, Karesas koron, La tendara adiaŭa).

Unue la diskoj estis prezentitaj kaj vendataj en la 21-a Rusia Esperantista Kongreso. Nun tiujn ĉi diskojn povas akiri ajna deziranto. Al la mezo de januaro la unua eldonkvanto (po 100 ekzempleroj de ĉiu disko) preskaŭ elĉerpiĝis kaj jam estas produktita la dua.

La loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KŜ povas aĉeti la diskojn ĉe Libroservo de REU (p/k 4716, 432063 Uljanovsk; re-tadreso <yuka@chat.ru>).

La loĝantoj de aliaj landoj povas mendi la diskojn ĉe Libroservo de UEA.

La registrado de la tria disko „Oraj kantoj” estas planata por aŭtuno 2002 en Tihvin.

Garik KOKOLIJA
Interredaktore



2a PREMIO: Gražvydas JURGELEVIČIUS (Litovio) pro „Avo kaj nepoj”.

3a PREMIO: Robert KAMIŃSKI (Pollando) pro „Sonorilturo”.

LAŬDAJ MENCIOJ: Raita PYHÄLÄ (Finnlando) pro „Ĝuu”;

Igorj LOJKIN (Ruslando) pro „Fangorn”;

Andrea OTTOK (Hungario) pro „Ankaŭ tio estas Frankfurt”.

La speciala premio pro foto teme ligita kun Esperanto ne estis aljuĝita.

Laŭ la Regularo de la Konkurso, la or-

ganizantoj havas ekskluzivan rajton ĝis la 31a de decembro 2003 uzi ĉiujn ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. La unua ekspozicio kun la plej interesaj fotoj de la unuaj tri konkursoj estis okazigita je la Zamenhofa Semajnfino (Kaliningrad, 15-16 dec 2001).

Dankon al la partoprenintoj! Gratulon al la laŭreatoj!

Halina GORECKA
sekretario de la konkurso

**Nekrologo
IN MEMORIAM H.A. DE
HOOG (1909–2001)**

La 1-an de decembro ni, Leen HORDIJK kaj Jacques TUINDER, renkontiĝis en aŭlo de la krematorio „Velsen” en Driehuis. Dum sobra funebra solenaĵo ili adiaŭis nian eminentan membron, Henk Arie DE HOOG. Kune kun granda aro da parencoj kaj konatoj ili aŭskultis kortuŝajn parolojn de la pli aĝa filino Thilda kaj la filo Frits.

Henk DE HOOG nepre faris ĉion eblan, por ke emu la granda publiko akcepti la internacian lingvon kaj nelaste la Kristanan Esperanto-Movadon. Kaj tiun vere ampleksan taskon li moŝte plenumis ĉiumaniere, verkante konvinkajn artikolojn, farante radio-paroladojn, instruante, tradukante himnojn, verkante librojn pri gramatikaj kaj aliaj temoj, koncize kronikante la historion de KELI, rolante kiel valora membro de la Akademio de Esperanto. Jes, lia granda amo estis Esperanto!

Alia vera pasio, flanke de liaj familio kaj laboro kiel mezlerneja profesoro, estis studado. Li proprigis al si multajn lingvojn, krom la francan, germanan kaj anglan ankaŭ la hispanan kaj italan. Por siaj fakaj laboroj li akiris plurajn aktojn. Li estis ĉiurilate bonega instruisto. Dum kongresoj li ofte eksplikis diversajn prilingvajn problemojn, tiel nomatajn ‘esperantaĵojn’. Tiam li tiris al si plenan atenton de siaj aŭskultantoj. Kaj kiom bone kaj humure li kapablis tion fari!

Henk DE HOOG ankaŭ estis pensanto. Lia filo Frits inter alie diris pri tio la jenon:

„Ade studante li klopodis kiel reformita kristano veni al Scio. Studado estis por li dumviva alvokiĝo. Tion li faris kun plezuro kaj granda disciplino. Ankaŭ sur la terenoj de religio kaj historio. Fine li ne plu aprezis la predikatan mesaĝon de la instituciiginta eklezio. Li kreskis al difinitaj konkludoj pri la kosmo kaj sia loko en ĝi. Li spertis ke li alvenas ĉe la rando de la kristana eklezio. Li ne plu povis akcepti la Paŭlan influon sur la prakristanismo kun la plej grava doktrino pri repaciĝo kaj sur ĝi bazita savo eterna de homa animo.

Li nepre ne estis pia homo. Kvankam en pasinta tempo ni hejme faris la kutimajn ritojn kiel preĝadon antaŭ kaj post la manĝoj kaj la ĉiutagan bibliolegadon post la manĝado, ni ne multe rimarkis pri tio, kion oni nomas ‘promenado kun Dio’. Oni jes povas diri, ke li vere interesiĝis pri la eklezia vivo. Ĉiudimanĉe li frekventis preĝejon, kaj malavaris liaj donacoj por eklezia laboro. Neniuj karakterizoj mankis, ĝis eĉ membreco de NCRV (Kristana Radio-Unuiĝo) kaj abono al Trouw (jurnalo por aktivaj kristanoj)”.

Henk DE HOOG postlasis spiritan testamenton, kiun voĉlegis lia filo. En ĝi li konfesis, ke li konscias pri sia malgrandeco kiel parto de la kosmo, kaj sian limitecon. Li opiniis tute ne necese, ke post lia forpaso eklezia fakulo prizorgu la meditado dum la funebra solenaĵo. Li preferis, ke faru tion la infanoj! Kaj tiel ankaŭ okazis. Ni konsideras nin feliĉaj, ke tian homon ni havis en la koro de la Esperanto-movado.

Jacques TUINDER, prezidanto de KELI
Leen HORDIJK, eksestrarano de KELI

**NOVJARA MESAĜO DE
VIA PREZIDANTO**

Kiun Rubikonon ni transiru?

La 15-an de decembro mi ĉeestis la tradician Zamenhoftagan celebron en mia regiono. Ĝojigis ĉiujn ke sufiĉe multe da homoj alfluis por rememori la grandan homon, al kiu ni dankas la internacian lingvon, al ni tiom karan, utilan kaj necesan. Ĉu ni ne konas lin kiel idealiston, profeton, etikan pensulon, lingviston, oratoron, verkiston, tradukiston, okuliston, humaniston kaj homaranon? Kaj mi ne laste menciu: kiel Hebreon (ĝia etimologio estas: transiranto) kiu ‘transiris la Rubikonon’!

La organiza komitato petis al mi prizorgi la memorigan paroladon, kiun taskon kun plezuro mi akceptis. Kiam mi denove enprofundiĝis en la persono kaj la vivo, pensado kaj verkado de ‘nia Majstro’ (titolo kiu ege malplaĉis al Zamenhof kaj fakte jam tute arkaikiĝis), min ree trafis forte la kortuŝa religieco de D-ro Esperanto. „En la mondon venis nova sento...” La aŭtoro de la bona lingvo kaj la iniciatinto de la projektoj ‘Hilelismo’ kaj poste ‘Homaranismo’, vere esperis pri nova tempo (sen glavoj sangon soifantaj), pri kvazaŭ-mesia epoko, kiun karakterizas sankta harmonio, paco, justeco, egaleco kaj interhoma gefrateco. Lia parolado al la unua universala kongreso, kolektiĝinta en Bulonjo-sur-Maro sub la verda standardo, jes ‘sub la sankta signo de l’ espero’, plej klare atestas pri tio. Li revis pri tero sen limoj, sen muroj, sen popoloj inter si dividitaj per malsamaj lingvoj kaj religiaj konvinkoj. ‘La sankta amo’ disbatu ĉion kio faras la mondon eterne militanta kaj malhelpas al la

reunuiĝo de la homaro. La revo estis: unu granda rondo familia.

En la himno „La Espero” ni trifoje aŭdas la adjektivon sankta, sed ankaŭ en aliaj poemoj, tre emfaze en la Bulonja kongresparolado. Esperantisto laŭ li estas ‘paca batalanto’, ‘apostolo de sankta afero’.

Por mi la plej bela korelverŝo, kiun Zamenhof vortumis, nepre jenas: „Kio pli bela en la mondo ol plena sekvado al instruo de Jesuo”. Kiu KELI-ano ne konsente subskribos?

Realisto devas konstati, ke ‘la nova sento’ restis kaj restas ĝis nun revo, sonĝo, utopio, espero (por la kredanta homo: promeso!); la malo de nia ĉiutaga realeco. Sed ni povas esti feliĉaj, ke tamen ankoraŭ iras forta voko tra la mondo. La nin alparolanta, vokanta voĉo de Dio. Li voku ankaŭ nin, kristanajn esperantistojn, kunlabori al la realigo de mondo, en kiu loĝas justeco kaj paco, vero kaj amo. Ni do ne detruu Lian mondon, kiun Li donacis al ni por vivi!

En la mondon venis nova sento, nova evangelio, kiam Dio inter ni homiĝis. Por mi, paco-aktivisto, nova estas tio, kion mi ĵus legis sub la titolo ‘homaj rajtoj kaj devoj’. La internacia movado „Konscienco kaj Pac-imposto” (CPTI) intencas pledi ĉe Unuiĝintaj Nacioj pri tio, ke la rajto rifuzi kontraŭkonsciencan kunpagon al milito kaj militpreparado estu homa rajto. En alia loko vi trovos la kompletan tekston de la pledo.

Kiel nune homoj povas rifuzi soldatiĝi, ĉar ilia konscienco malpermesas al ili mortigi, tiel postmorgaŭ — espereble — eblos impostpagante elekti inter malbono kaj bono, ‘por la milito’ aŭ ‘por la paco’. Ĝis nun mi devas akcepti ke de kono de mia imposta kontribuo fluas al celo kiun mi malaprobos.

En KELI pri tiu afero oni ĝis nun tute ne diskutis. Ĉu novjara mesaĝo povus instigi niajn membrojn pripensi tiun temon? Militoj ne apartenas al katastrofaj kategorioj kiel inundoj, tertremoj kaj uraganoj. Militoj simple 'prezentiĝas', ĉar homoj pretas batali, ĉar homoj volas fari kaj uzi armilojn. Sed milito tute ne okazus, se neniu kunpagus... Ĉu navi utopio? Ĉu paŝo survoje al Zamenhofa 'sankta harmonio'? Ĉu tasko esence misia?

La tri plej fundamentaj pasioj kaj obcedoj ĉiutempaj estas: milito, amo kaj mono. Multe da Eŭropanoj ekde la unua de januaro kantadas: „En la mondon venis nova mono”. Sekve, samtempe sonu forta voko, ke servu la eŭroj al paco kaj justeco, al progreso, al nova mondo, al sankta harmonio, al interfratiĝo, por ke 'la bela sonĝo de l' homaro', finfine, fariĝu beno ĉiama! Ke mia mesaĝo ne restu surpapera mono-logo, baldaŭ paliĝonta, sed provoke invitu al serioza dialogo!

La venonta KELI-konferenco temos pri limoj. Nu, ni demandu al ni kie situas la limo inter tio, kion ni pagu al Dio kaj la cetero kiun ni ŝuldas al la imperiestro... Ĉu ankaŭ la malgranda KELI-familio, bedaŭrinde pli laŭaĝe ol statistike kreskanta — sed tamen nemalŝatinda ero de 'la granda rondo familia' — povus esti pli principaj kaj praktikaj 'pacaj batalantoj', kiel ni tiom laŭte kantas en 'La Espero'? Kion vi opinias? Kiun 'Rubikonon' kristano transiru por kontribui al la proksimiĝo de la Regno, kiun anoncis Jesuo? Ĉu sufiĉas, ke nur Dio homiĝis, aŭ sekvu ankaŭ la anoj de Kristo?

Jacques TUINDER

NOVJARA SALUTO DE LA KELI-KASISTO

Tre estimataj gefratoj en Kristo, vi estas membroj de KELI aŭ abonantoj de Dia Regno kaj via kasisto havis dum la pasinta jaro sufiĉe multajn kontaktojn kun vi. Suminte viajn retadresojn estis surprizo por mi, ke tiom el vi jam uzas la interreton. Eble via elektronika poŝtkesto jam ricevas sufiĉe da mesaĝoj kaj vi protestos pro ĉi tiu novjara saluto. Mi jam nun petas vian pardonon, ĉar nia komunikilo restu Dia Regno. Mi ja ne kuraĝas eldoni KELI-adresaron pro la datprotektado kaj mi esperas, ke la supra retadreso ne tuŝas la datprotektadon. Esperanto ja vivas en la interreto kaj mi fieras, ke ankaŭ nia modesta movado tiel multnombre uzas la teknikan progreson. Bonvolu permesi al mi esprimi mian ĝojon kaj ligitecon kun vi per ĉi tiu saluto.

Ben- kaj bon-deziras
Siegfried KRÜGER

La venonta jaro...

La venonta jaro —
ĝi alportu al ni,
kion ni donis al la pasinta.

Pacon —
se ni vivis paceme;
Benon —
se ni agis bene;
Feliĉon —
se ni donacis feliĉon al la proksimuloj.
Kiu tremas je ĉi tiu penso,

petu pardonon.
Kiu gaje jesas la penson,
estu laŭde glorata!

Damnitaj estas nur tiuj,
kiuj forgesas pripensi —
ĉu el petolo,
ĉu el malvigleco,
ĉu el timo.

Pro tio ni strebu
en 2002 tiel vivi,
ke ni je la fino
apartenu al la grandaj animoj,
kiuj gaje kaj dankeme petos:

La venonta jaro —
ĝi alportu al ni,
kion ni donis al la pasinta.

Laŭ teksto en germana gazeto
de Fred WIESEN
tradukis Siegfried KRÜGER

52-A KELI-KONGRESO

KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia) organizos sian 52-an Kongreson inter la 3-a kaj 10-a de aŭgusto 2002 en Berekfürdő, proksime al Karcag-Debrecen, en Hungario. Informoj kaj aliĝilojn petu de Irén BAGI, Budapest, Baross út 54/b H-1201 aŭ de Éva FARKAS-TATÁR, Budapest, Dohány utca 36, H-1077, <Farkas-Tatar_Eva@externet.hu>.

Zoltán SOMHEGYI

ŜARADO

El la silaboj

a — ci — e — er — fan — fir — fo — for
— ki — kon — la — le — le — lo — ma
— ma — ma — mi — mo — mo — nas
— ni — ni — no — no — no — o — ob
— te — to — to — to — u

formu 10 vortojn kun la subaj difinoj.

El la komencaj literoj legataj de supre malsupren rezultas tiu, kiu sin pretigas, por ricevi la bapton.

1. Japana vesto, 2. besto, 3. komunikilo, 4. granda mamulo, 5. firmiga kristana rito, 6. serva kostumo, 7. brakparto, 8. izole vivanta piulo, 9. eligi el si idon, 10. hostio.

Fritz LAUTENBACH

Solve de la vortserĉludo 831

horizontale: Predikanto, Amos, Eliro
vertikale: Genezo, Malaĥi, Jesaja, Psalmaro.
diagonale: Nehemja, Levidoj, Ezra.

KELI-Kunveno en la UK en Fortaleza

Ni serĉas KELI-anojn kiuj povos prezenti KELI-n en la komuna kristana fak-kunsido.

Turnu vin al la sekretariino, adreso sur 2-a paĝo de ĉi tiu numero.

KOREKTENDO

Ĉiuj Nederlandanoj komprenis kompreneble ke la nederlanda kotizo ne estis indikita en NLG sed en EUR, t.e. 24,45 €.

Du etaj riĉaj fiŝkaptistoj

Petro kaj Paŭlo, ĝemeloj, loĝantaj en la Kaprostrato n-ro 14 de Anglurbo, ĵus spektis porjunularan televidprogramon. Ĝi forte impresis Petron, ĉar oni raportis pri infanoj vivaĉantaj en barakaro por rifugiintoj. „Kia kaoso kaj mizero tie-asi! — li elkrias. — Mi ĝojas ke mi ne bezonas restadi en tia kampadejo.”

Paŭlo tute samopinas kun sia frato. „Eble ni povus ion fari por helpi al tiuj infanoj — Petro proponas, — simple ŝpari dum tuta semajno niajn frandaĵojn kaj ilin sendi al tiuj infanoj; tiam ili povus ĝui almenaŭ ion bongustan”. „Nu, ĉu tiu helpado ne estas tro malforta, ĉar tro amase svarnas ja infanoj en tiu kampadejo?”, opinias Paŭlo.

La frateroj ne sukcesas pripensi solvon. Bonŝance alvenas Fatima kaj Johano, ĉar ili ĵus pretigis siajn hejmotaskojn kaj ricevis permeson ludi ekstere kelke da tempo.

„Ho, kiom seriozaj vi aspektas! — diras Johano, — ĉu eble okazis io grava?”

Petro rakontas, kion ili vidis sur la televida ekrano kaj ke ili sekve deziras ion pozitivan entrepreni.

„Nu, ni simple iru de domo al domo por kolekti monon”, Fatima proponas.

„Jes — diras Paŭlo, — ni povas helpi al homoj per etaj deĵoroj kaj tiel perlabori monon; ideo tre praktika!”

„Verŝajne tio ne sufiĉas — respondas Fatima, — eble ni donu ankaŭ iom da poŝmono!”

„Ho nel! Tute nel! Tre malbona ideo! — opinias kaj Petro kaj Paŭlo. — Nia plano ja estas ŝpari monon por aĉeti

novajn fiŝkaptilojn”. „Ni faru multe da deĵoroj — diras Petro, — sed nune ni vere tre urĝe bezonas nian poŝmonon por ni mem!”

„Jes — aprobe konsentas la frato, — niaj kaptiloj tute eluziĝis; ili nepe ne plu taŭgas por fiŝkaptado!”

„Por hoketigita ezoko estas tre facile fuŝi plene niajn kaptilojn; ni do vere devas ŝpari nian monon” — Petro pli klare eksplikas.

Fatima dume iom kolorigas. „Vi kun tiu terura fiŝkaptado! Ĉesigu tiun stultan kutimon kin taŭgas por nenio! Vi krome dolorigas tiujn fiŝojn, kaj tio estas la prezo, kiun kompatindaj infanoj en la kampadejo devas pagi? Bal! Kiom stultaj vi estas, ke vi pensas sole nur pri viaj propraĵ plezuretoj!”

„Sed fiŝkaptado estas tre bela sporto — diras Petro, — kaj al sporto oni devas ĉion oferi!”

Fatima kaj Johano ne sukcesas konduki la ĝemelojn al aliaj pensoj. Ili sekve decidis fari deĵorojn, ĉar tiam ankaŭ la du fratoj pretas partopreni.

„Nenio estas pli malfacila ol malpermesi fiŝkaptadon al tiu duopo” — Johano flustras al sia fratineteto, dum ili decidas iri hejmen.

„Jes — respondas Fatima, — estas multe pli simple instrui al kaprino kiel lavpurigi pladojn aŭ ciri ŝuojn!”

Laŭ Christa HINSTER
Prilaboris: Jacques TUNDBER
(27.12.2001)